

Seminario pri la aŭd-vida instruado en Basel
Claude Gacond, 424-a radioprelego, 1971.11.24 & 27

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

A.- Je la sabato 30-a kaj dimanĉo 31-a de oktobro 24 geesperantistoj el Svislando, Francio kaj Germanio grupiĝis en la bazela lernejo Bläsi por konatiĝi kun la aŭd-vida instrutekniko.

Cl.- La Instrudepartemento de la Kantono Bazelo-Urbo favoris la disvolviĝon de tiu Seminario pri aŭd-vida instruado de esperanto, metante je nia dispono tutan lernejon ne nur por la studhoroj, sed ankaŭ por la manĝoj kaj tranoktado.

A.- Jen rapida priskribo de tiu pedagogia manifestacio, kiu grupigis por triono profesiajn pedagogojn kaj por la du aliaj trionoj aliprofesianojn, kiuj plenumas gvidfunkciojn en esperanto-rondoj. Pluraj societoj subvenciis delegiton per repago al li de la vojaĝkostoj kaj de la seminaria kotizo, kiu estis 20 svisaj frankoj.

Cl.- La laboro komenciĝis je la sabata posttagmezo per prelego de Klaŭdo Trésorier el Besançon, Francio, studento pri lingvistiko kaj juna instruisto de la franca lingvo por fremduloj per la aŭd-vida tekniko *Voix et images de France*. Dank'al tiu prelego la seminarianoj komprenis, ke la aŭd-vida instruado estas la rezulto de scienca esplorado.

A.- Post paŭzo, kiu permesis trinki kafon aŭ teon kaj dum kiu viglis la unuaj pedagogiaj diskutoj, la seminarianoj fariĝis gelernantoj, kaj mia edzo Claude Gacond prezentis al ili la dekan lecionon de la aŭd-vida kurso de esperanto, kiun li eksperimentis dum du jaroj. Ofte la fluo de la leciono estis interrompita por doni metodologiajn klarigojn aŭ respondi al la demandoj de la gelernantoj.

Cl.- La manĝoj estis tre simplaj. Akvo bolis aŭ provis boli en kaserolo, kaj ĉiu mem pretigis kafon aŭ teon manĝante piknikaĵon. Tiu formulo estas ŝatata, ĉar la manĝoj ne perdigas tro da tempo kaj povas kosti ege malmulte, kio ne ĉiam okazas en restoracio.

A.- Dum la sabata vespero la seminarianoj iris al la prelegejo de tiu bazela lernejo. Tie ili trovis la instruiston Kurt Schweizer, en kies klasejo ni laboris, kun lia tuta klaso kaj kun multaj gepatroj kaj parencoj de tiuj gelernantoj.

Cl.- Mi malfermis la vesperon per kelkaj vortoj pri la nuna aktualeco de esperanto.

A.- Poste Kurt Schweizer demonstris al ni, kiel li laboras kun siaj gelernantoj. Jen ni aŭskultigas al vi ritmikan ekzemplon, kiu montros al vi, kiel oni povas akriĝi la aŭskultan kapablon de gelernantoj antaŭ ol komenci instrui al ili fremdan lingvon. Ni konas multajn plenkreskulojn, kiuj estus tute nekapablaj fari tion, kion faras tiuj dekjaraj geknaboj. Aŭskultu : (Registraĵo)

A.- Ni donas al vi klarigon : la ritmojn frapas la instruisto, kaj ilin poste manfrapas la infanoj. (Fino de la registraĵo)

A.- Tiujn ritmikajn demonstrojn sekvis aŭd-vida lecioneto. Mia edzo instruis esperanton al tiuj gelernantoj sub la atenta kontrolo de la gepatroj kaj seminarianoj. Sen unu sola vorto en la germana lingvo, nur per bone elektitaj bildoj kaj taŭgaj komentarioj li kapablis instrui sufiĉe da lingvaj strukturoj, por ke post kvaronhoro la gelernantoj povu respondi al demandoj kiel : *Ĉu la kato povas vidi la muson ?* per *Ne, la kato ne povas vidi la muson*. Kaj *Ĉu la muso volas manĝi la piron ?* per *Jes, la muso volas manĝi la piron*.

Cl.- Antaŭ ol nin adiaŭi la geknaboj kantis al ni kantojn en esperanto, kiujn ili lernis dum la ĵus pasintaj lernejaj horoj. Post tiu prelego ni aŭdigis al vi unu el ili.

Seminario pri la aŭd-vida instruado en Basel
Claude Gacond, 424-a radioprelego, 1971.11.24 & 27

A.- Dum la gepatroj venis rigardi la esperanto-libro-standon kaj ricevis prospekton de FIAT en esperanto, dum la gelernantoj manĝis bulkon, kiun ili bone meritis, la seminarianoj konatiĝis kun la naĝejo de tiu bela lernejo. Estis tre agrable povi sin bani kaj naĝkonkursi post tiu tre plena stud-tago.

Cl.- Por la tranoktado, kiuj kunportis kampingan materialon, tiuj povis tranokti en diversaj klasejoj de tiu lernejo. En plej diversaj lokoj ni vidis seminarianojn, kiuj pumpis aeron en aermatracojn aŭ malfermis sian faldeblan liteton. Sed la konversacioj ankaŭ viglis ĝis sufiĉe malfrue, iliaj ĉeftemoj rilatis instruadon kaj la lernejan vivon.

A.- La dimanĉo estis dediĉita al la eksperimentado de plej diversaj projekciiloj kaj al la ekzercado instrui aŭd-vide kaj eĉ al la redaktado de tribilda aŭd-vida lecioneto.

Cl.- Per tiu seminario dudeko da instruistoj kaj instruantoj konatiĝis kun instru-tekniko, kiu pli kaj pli sin trudas en la lingvo-instruado pro siaj pozitivaj rezultoj. Ni treege esperas, ke nun ili provos ekpraktiki tiun novan didaktikon. Ili havas je sia dispono lueblan materialon por 10 lecionoj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. La venontan semajnon ni parolos al vi pri Kálmán Kalocsay kaj Juan Régulo-Pérez. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-